

# Eŭropa Bulteno

Oktobro 2017, Numero 174

## PREPARO DE LA KONFERENCO DE V4-LANDOJ PRI EDUKADO POR EŬROPA CIVITANECO



En “Nitra Deklaro”, konkluda dokumento de la lingvo-politika konferenco de V4+ (Viŝegradaj) landoj “Perspektivoj de lingva komunikado en EU” en Nitro okazinta inter la 28a kaj 29-a de julio 2016 sub aŭspicio de Miroslav Lajčák, ministro de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio kiel aranĝo de la Prezidanteco de Slovakio en la Konsilio de EU, estis menciite, ke dum 60 jaroj de EU ne okazis komuna iniciato en tereno de edukado: „Ĝis nun ne okazis provo evoluigi komunan edukadon por eŭropaj civitanoj. Kialo de tio restas en la fakto, ke edukado kaj kulturo restis ekde la komenco ĝis nun je nacia nivelo en kompetentoj de EU membo-ŝtatoj.

En kunlaboro de Eŭropa Esperanto Unio (EEU) Asocio de Europa Konscio en Maribor (SI) kaj civitana organizo Edukado@Interreto en Parituzánske (SK) oni preparis projektan

proponon por organizi iniciatan konferencon pri komuna edukado al eŭropa civitaneco en elementaj kaj mezaj lernejoj.

La projekta propono estis prezentita al Ŝtata Pedagogia Instituto de Slovakio, kiu konsideris la proponon kiel pozitiva iniciato. La 24-an de oktobro okazis unua laborkunveno pri la projekta propono. Estis interkonsentite ke la Ŝtata Pedagogia Instituto preparos informon pri la proponita projekto al Ministerio de Edukado, Scienco, Esploro kaj Sporto de Slovakio por organizi la iniciatan konferencon de V4 landoj (CZ, HU, PL, SK) en Bratislavo la 26-an de septembro 2018 kaj petos Martina Lubyová, ministrinon de Edukado pri ŝia aŭspicio. Post ŝia decido estos preparita projekta propono por la konferenco, kiu estos prezentita al Internacia Viŝegrada Fondaĵo kun peto pri financa subteno. Organizantoj volus inviti al la konferenco kiel ĉefparolanton Tibor Navracsics (HU), Komisionano de EU por Edukado, Kulturo kaj Multlingvismo.

Oni planas, ke konkludoj de la konferenco de V4 landoj povus esti prezentitaj kiel iniciato de V4 landoj dum kunsido de la Konsilio de Ministroj de Edukado de EU por inviti aliajn EU landojn al diskuto pri komuna edukado pri eŭropa civitaneco en elementaj kaj bazaj lernejoj kun la celo kontraŭstari kaj haltigi negativan tendencon gvidantan al kresko de malfido de civitanoj al EU, al eŭropismo, al kresko de naciismo, ekstremismo, ksenofobio kaj interreta maltoleremo.

Jozef Reinvar

## KOMENCIĜAS PREPARLABOROJ POR LA KONGRESOJ 2018



Kiel ni jam anoncis, profitante ke la 103 Universala Kongreso de Esperanto okazos en Lisbono, diversaj aliaj esperantistaj eventoj estos organizataj en somero 2018 en la Iberia Duoninsulo, por ke vizitantoj povu profiti la vojaĝon kaj la okazaĵon.

Konkrete, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) havos sian kongreson en Madrido, de la 21-a ĝis la 28-a de julio 2018 (do ĝuste antaŭ UK en Lisbono). Parte koincide kun ĝi, inter la 20a kaj 22a de julio, okazos ankaŭ en Madrido la Hispana Kongreso de Esperanto.

En la komenco de septembro, profitante la viziton al Madrido de la respondeculo pri kongresoj de ILEI, oni formaligis la lokan organizan komitaton de ambaŭ kongresoj, kaj oni komencis la pretigon de la necesaj laboroj. Oni vizitis la antaŭviditan kongresejon (studentan rezidejon Colegio Mayor Chaminade), kelkajn hotelojn kaj gastejojn serĉante kromajn loĝeblojn, oni interparolis kun respondeculo pri internaciaj eventoj de la madrida urbestro, ktp. Estis skizita la enhavo, la programo, kaj aliaj detaloj. En venontaj semajnoj estos disponeblaj la unuaj informoj, inklude de la kotiztabelo, la aliĝilo, k.s.

Post la UK, inter la 4a kaj 11a de aŭgusto, okazos en la ekstremadura urbo Badajoz (Badaĥozo) la Internacia Junulara Kongreso, laŭ la decido de TEJO. Ankaŭ ĉikaze oni komencis pretigi la necesajn kondiĉojn, pri kiuj ni informos en venontaj semajnoj. Dume, rezervu la datojn. Vi havos la okazon ĝui belan esperantistan etoson, intensan kaj por ĉies deziroj!

Tonio del Barrio

## **ASEMBLEO DE EEU EN LISBONO**

La estraro de EEU decidis ke la asembleo en la sekva jaro okazos dum la UK en Portugalio, do en Lisbono. Ni invitas ĉiujn membrojn de la asembleo plani veturi al UK por povi plenumi sian devon partopreni en la jara asemblea kunsido. Okazos kiel kutime du kunsidoj de la asembleo: tiu formala nur por la membroj de la asembleo kaj unu publika por ĉiuj interesitoj inter la partoprenantoj de la Universala Kongreso. Pri la datoj de la kunsidoj kaj tagordoj ni infomo per ĉi tiu bulteno plej malfrue en aprilo 2018. La estaro de EEU kunsidos ankaŭ dum la UK kaj la estzraranoj partoprenos ankaŭ en pluraj aliaj aktivecoj dum UK.

Zlatko Tišljarić

## **EKSPOZICIO "TRANSLATION MATTERS" EN EESK/KdR**

*"La lingvo de Eŭropo estas tradukado" – Umberto Eco*

Okaze de la Internacia de Tradukado proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (sabato la 30a de oktobro, mortotago de Sankta Hieronimo kiu estas patrono de tradukistoj), la 29an de oktobro 2017 malfermiĝis en "la Trèves-konstruaĵo", unu de la komunaj konstruaĵoj de Eŭropa Ekonomia kaj Socia Komitato (EESK) kaj Komitato de la Regionoj (KdR) en Bruselo, ekspozicio pri tradukado "Translation matters" (vortlude "Aferoj pri-tradukaj / Tradukado gravas"). La ekspozicio kunigis tridekon da kontribuoj de getradukistoj el la sama komuna tradukservo de EESK/KdR (inter ili ankaŭ de Esperantistino ;), kiuj depost tiu-ĉi jaro ĉiuj troviĝas en tiu sama kaj la tuj najbara konstruaĵo, sub la gvido de kroata tradukunestrino Suzanna Matvejevic. Por la malfermo, getradukistoj el la diversaj tradukunuoj laŭtleĝis eron el la Ŝekspira komedio "Somermeznokta Sonĝo", ĉiu en sia lingvo, antaŭ komuna tagmanĝo kun manĝaĵoj el la diversaj EU-landoj.

La ekspozicion vizitis ne nur la getradukistoj de la du Komitatoj, sed interalie ankaŭ la du Ĝeneralaj Sekretarioj kaj la du Prezidantoj de kaj EESK kaj KdR, kaj du membroj de la apuda Eŭropa Parlamento. Dum la du vizitoj kiujn mi mem ĉeestis, montriĝis ke Jiří Buriánek, la Ĝenerala Sekretario de KdR, kaj Karl-Heinz Lambertz, la novelektita Prezidanto de KdR, ambaŭ mem iam laboris kiel tradukistoj, do ili proprasperte komprenis la malfacilojn de tradukado kaj tre interesiĝis pri ties diversaj aspektoj montritaj en la ekspozicio. Je la tablo pri

Esperanto, s-ro Buriánek interesiĝis interalie pri la rilato inter Esperanto kaj la paco-movado, dum s-ro Lambertz – kiu venas el germanlingva orienta Belgio – demandis pri la teritorio de Neŭtrala Moresnet. La Ĝenerala Sekretario de EESK, Luis Planas Puchades, siavice iam estis diplomato kaj estis tre bone edukita pri multaj de la ekspozicioroj.



La kontribuoj en la ekspozicio kovris vastan aron da tradukado-rilataj temoj: ĝi komencis per la fama "Reglamento numero 1" de Eŭropa Unio pri ties laborlingvoj kaj tradukado en EU tiam kaj nuntempe, kun video kreita tiucele, kaj ankaŭ specife pri la tradukservo de EESK/KdR; poste sekvis rigardo tra la

traduk-historio ekde Antikva Egiptio (kun interalie la fama Rozeta ŝtono), tra mezepoko kun diverslingvaj tradukoj de la Sankta Biblio (kun ekskursoj pri cenzuro de libroj kaj tradukoj, kaj pri germanigo de la Biblio fare de Martin Luther); pri la rolo de kaj labormanieroj en la Tradukskolo de Toledo en Hispanio; pri Esperanto kaj la rolo de tradukado en ties kreigo (aldona ero pri la rolo de Esperanto en terminologio bedaŭrinde estis fortranĉita pro spacomanko, sed ĝi ja menciigis en la akompana faldfolio kaj en pluraj ekspoziciitaj libroj priaj); pri interesaj retaj artikoloj pri la rolo de tradukado en i.a. NROoj por helpi homojn post katastrofoj, aŭ de John Le Carré por kompreni alilingvajn rigardojn al la mondo; pri la diferencoj inter tradukado kaj interpretado (unu estas skriba, la alia parola – tial iuj nomas ĝin "buŝtradukado" en Esperanto – kaj el tio rezultas aro da diferencoj pri necesaj kapabloj kaj labormanieroj); pri famaj getradukistoj el ĉiuj EU-membroŝtatoj; pri amuzaj mistradukoj; kaj pri elrigardo al la estonteco, kun eblaj estontaj evoluoj pri nuna kaj planata aŭtomata tradukado kaj kun la rolo de lingvoj kaj tradukado en sciencfikcio. Al la grandaj fenestroj estis afiŝitaj citoj mezlongaj kaj longaj pri lingvoj kaj tradukado (mallongaj citoj krome disponeblis kiel paĝmarkiloj, parto da ili venis de lingvo.info). Fine vizitantoj povis afiŝi en granda tabulo kial por ili tradukado gravas, kaj/aŭ kontribui pliajn amuzajn mistradukojn. Entute estis larĝa gamo da tradukrilataj temoj – malgraŭ manko de propra buĝeto kaj de pli vasta varbado –, danke al la entuziasma kunlaboro de la kontribuintaj getradukistoj.





La ekspozicio finiĝis la 20an de oktobro je tuttaga Malferma Tago de la komuna tradukservo de EESK/KdR, kiu inkluzivis enkondukon al la traduka laboro de la du Komitatoj kaj la vojo de dokumentoj trans tradukado ("kien iras mia dokumento?" por la ne-tradukaj unuoj de la Komitatoj),

rondgvidadon tra la traduk-administra unuo (kiu distribuas la tradukotajn dokumentojn al la bezonataj tradukunuoj, faras antaŭkontrolon de la originalo kaj donas limdatojn) kaj la franca tradukunuoj, viziton al la ekspozicio kaj kelkajn ludojn kaj kvizojn. Je la enirejo oni montris surbendigon de la multlingva laŭtleĝado de Ŝekspiro el la malferma aranĝo. Krom la novelektita Prezidanto de KdR venis al tiu konkluda Malferma Tago ankaŭ ses grupoj da vizitantoj, kiuj ĉiuj ricevis rondgvidadojn. Ankoraŭ ne eblas diri kun certeco, sed estas ebleco ke venontjare por la sekva Internacia Tago de Tradukado oni denove organizos ion similan.

Sandra Schweder

(tradukasistentino en la germana tradukunuoj de EESK/KdR, kaj unu el momente tri geesperantistoj en la Komitatoj)

## EKZEMPLA AGADO DE MODESTULO

Nur malmultaj personoj el la Esperantomovado konas min. Mi tre malofte partoprenis Esperantajn kunvenojn aŭ eventojn. Mi nur POResperante agadis/as, neniam PEResperante. Mi eĉ ne flue parolas la internacian, ĉu pro manko de paroladsperto, ĉu pro manko de iuj cerbaj interligoj...? Jen mi.

La 19-an de junio 1997 mi skribis mian unuan leteron al la junularo de la Flandraj politikaj partioj: *Sama dua lingvo por ĉiu E.U.-civitano*. Hodiaŭ mi ankoraŭ agas simile. Dum la pasintaj 20 jaroj mi kelkfoje havis sukces(et)ojn: publikigo de legantleteroj en diversaj ĵurnaloj, partopreno en nacia radioprogramo (1998), publikigo de artikolo en la plej grava Flandra ĵurnalo, *De Standaard* (07/08/2000), perita de ĝia ĵurnalistino *Mia Doornaert*, (en 2003 la reĝo nobeligis ŝin baronino. Ĉu ekzistas interrilato? : - ) ), intervjuo aranĝita de la Brusela televido kaj debato en la konstruaĵo de la E.U. kun la Nederlanda komisionanino

Lousewies van der Laan ( <https://www.youtube.com/watch?v=Uj2Upu5TtZ0> 24/04/2001 ), du intervjuoj kun la regiona televido, ktp. La komenco do esperplenis.

Laŭ konsilo de Ivo Durwael, la tiama prezidanto de FEL, mi ekkunlaboris kun Germain Pirlot, kiu tiutempe jam multajn jarojn agadis en la franclingva partio de Belgio. De 2000 ĝis 2002 mi helpis David Ferguson, akuzante la EU-on pri lingvodiskriminacio. Tamen, la lastan jardekon la intereso de la Flandraj gazetoj kaj komunikiloj malpliigadas.

Antaŭ du jaroj la Flandra ministrino pri edukado, *Hilde Crevits*, lanĉis publikan debaton pri la estonta enhavo de la edukado. Leo De Cooman, demultjara aktivulo, invitis min partopreni. Kune ni sendis 26 kontribuojn en la forumon.

Kadre de tiu reformo de la edukada programo mi ankaŭ ĉeestis du eventojn (provincan kaj nacian) por atentigi pri Esperanto. Tio vekis la atenton de la prezidantino de la Flandra Komisiono pri Edukado, *Kathleen Helsen*, kiu je la deka de majo aranĝis kunvenon por kvarkapa FEL-delegacio kun la kunordiganta organizaĵo “Lingvopolitiko pri la Nederlanda”, enhavanta reprezentantojn de la katolika, la oficiala, la urba/provinca edukado kaj la konsilio de malgrandaj lernejoj, kiaj tiuj laŭ Steiner. Ĉe la fino de tiu interparolado oni promesis sendi al ni raporton, se necese, kompletigendan. Ĝis nun nenion ni ricevis. Ĉu sakstrateto?

En la lastaj semajnoj okazis en Esperantujo diversaj gravaj faktoj, pri kiuj mi informis la politikistojn kaj la gazetaron: *EU financos studon pri Esperanto - Esperanto en la universitato de Liverpool - Unesko Kuriero*. Ĝis nun mi ricevis nur etan reagon de unu el la plej gravaj Flandraj komisionanoj pri edukado, *Koen Daniëls*: ‘Mi atendas la rezulton de la studo’. *Saĝa kapo duonvorton komprenas*. Iu profesoro respondis: *la afero interesas min, mi sekvas la evoluon*. Antaŭe iu lingvisto certigis min ke li aldonos nian informon al siaj prelegoj. Kvankam ni ne havas rektan, videblan rezulton, tamen esperigan.

Ekde kelkaj monatoj ni estas sepopaj por reagi al Flandraj gazetarartikoloj. Mi esperas ke tiu kuna, daŭra informado finfine pozitive influos la kapojn de la edukadresponduloj. Ĉu proksimestonte iu(j) kuraĝos rompi la silenton pri Esperanto?

Dan Van Herpe

## **BRITIO BEZONAS PLI DA LINGVISTOJ EN POSTBRITELIRA FAZO DE LA EVOLUO**

En la tutlanda gazeto The Daily Telegraph, kiu estas tre influa en mezklasaj rondoj en Britio aperis artikolo pri tiu temo. Se Britio volas sukcesi sen EU ĝi interalie bezonas multe pli da konantoj de fremdaj lingvoj. Pri tio la ministro por edukado Nick Gibb deklaris jene: Tutmonda Britio bezonas pli da lingvistoj se ni volas sukcesi post Briteliro. Jen la tuta artikolo: <http://www.telegraph.co.uk/education/2017/10/12/global-britain-needs-linguists-succeed-brexiteer/>

Mi komentis jene:

Lingvoj estis efektive formortigitaj de la nova strategio por lingvoj de Tony Blair, kiu pretendis fari ĝuste la malon de tio kion ĝi efektive faris. Instruistoj avertis kontraŭ ĝin. La angla estis puŝata malantaŭ la kulisoj en EU. Profesoro Robert Philipson provis atentigi pri tio per sia libro 'Ĉu nur-angla Eŭropo?'. Lingvoj ja gravas, kaj la britoj estas la lingvaj idiotoj de Eŭropo. Mi persone favoras la reenkondukon de Esperanto en niajn lernejojn, kaj la reinstalon de la ekzameni GCSE en Esperanto. Tiu estas la plej bona kaj plej efika maniero doni al duagrada lernejo bonan fundamenton en lingvolernado en almenaŭ sia unua jaro en duagrada lernejo. Se tio estus farita en granda skalo, multaj studentoj pluirus al aliaj lingvoj, sed ĉiuj estus kapablaj je konversacioj en Esperanto. Se tion ni farus, mi opinias, ke la ĉinoj kaj aliaj sekvus.

Ian Fantom

## **KER-EKZAMENOJ ĈE LA ITALA E-KONGRESO, SAN MARINO, 18-25-A DE AŬGUSTO 2018**



Ĉu vi ĉiam deziris akiri la oficialan diplomon pri Esperanto, kiun donas la ekzamenoj KER (Komuna Eŭropa Referenc-kadro), sed iom timis pro la soleneco de la ekzameno? Jen via okazo! Venu al la sendependa lando San Marino (interne de Italujo). San Marino estas la lando de libereco kaj tie aprobo en ekzameno estas konsiderata homa rajto.

Legu ĉion pri la ekzamenoj en <http://edukado.net/ekzamenoj/ker> kaj poste kontaktu nin, [kongreso@esperanto.it](mailto:kongreso@esperanto.it), por specifaj demandoj pri via situacio, por elekti la nivelon de la ekzameno (B1, B2, C1), kiuj okazos en la kadro de la venontjara Itala Esperanto-Kongreso, <http://kongreso.esperanto.it/85/bonvenon.htm>.

La LKK

## **INTERNACIA KALENDARO**

pri Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj, festivaloj! La "Internacia Kalendaro" listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kongresojn, festivalojn, kiuj akceptas vojaĝantajn esperantistojn kiel partoprenantojn.

- Vojaĝu al Esperanta renkontiĝo! Serĉu kaj trovu simpatian aranĝon, kun dato, nomo, mallonga priskribo, reteja adreso, ktp!
- Se mankas iu aranĝo, anoncu kaj registru ĝin senpage!

- Diskonigu, reklamu la Kalendaron al viaj Esperantistaj amikoj

La Internacian Kalendaron funkciigas teamo de la Esperanto-Centro "Eventoj" en Budapeŝto. La Kalendaro funkcias ekde 1996, kaj enhavas ĉiujare ĉ. 250 Esperanto-aranĝojn!

Adreso de la Internacia Esperanto-Kalendaro: <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

Se vi ŝatus esti kunlabora membro en nia teamo, kontaktu nin: Szilvási László, [szilvasi@eventoj.hu](mailto:szilvasi@eventoj.hu)

Bonan vojaĝon, agrablajn travivaĵojn!

Ret-Info / Lingvo-Studio, LS

<http://www.eventoj.hu>

## INTERNACIA RENKONTIĜO DE E-VERKISTOJ KAJ TRADUKISTOJ EN KROATIO



La renkontiĝo okazis inter la 14-a kaj 16-a de septembro 2017 en nordkroata vilaĝo Hrašćina kaj organizis ĝin Kroata E-Ligo sub la gvido de Spomenka Štimec. La ĉefa gasto estis poetino kroatdevena sed vivanta en Danlando Zora Heide, nun jam 93-jara. Alia gasto estis Tereza Nemere el Hungario. Oni krome legis el la literatura verkaro de pluraj aliaj esperanto-aŭtoroj. Ĉeestis kvindekde ĉefe kroataj

esperantistoj en tre bona etoso. En la programo estis ankaŭ koncerto de Neven Mrzlečki, Galerio de fotoj videblas ĉi tie: [http://www.esperanto.hr/verkistoj\\_fotoj\\_2017.htm](http://www.esperanto.hr/verkistoj_fotoj_2017.htm)

Zlatko Tišljarić

## 14-A RATA RENKONTIĜO EN HAMELEONO (GERMANIO)



Pretas la programo kaj aliĝilo por la 14-a Rata Rendevuo + jubilea festo de la Ratkaptista Bando. La Esperanto-grupo Hameleno kore invitas vin partopreni.

Jen la ligilo al la paĝo kun la programo kaj la aliĝilo: <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/hameln/14-rata-rendevuo-2017-en-hameleno-jubileo-30-jaroj-la-ratkaptista-bando>, kaj jen la ligilo al la pdf-formato por elprinti ĝin: <https://www.esperanto.de/sites/default/files/esperanto.de/og->



[hameln/Rata\\_Rendevuo/Einladung%20zum%202014.%20Rata%20Rendevuo%20in%20Hameln%20Esperanto\\_.pdf.](#)

Kaj jen la ligilo al la Facebook-paĝo: <https://www.facebook.com/events/1959958394218967/>  
Bonvolu dividi ĝin kaj inviti ankaŭ viajn amikojn.

Bonvenon en Hameleono en novembro.

Heinz-Wilhelm Sprick

## **Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de oktobro 2017

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Jozef Reinvart, Zlatko Tišljár, Sandra Schweder, Tonio del Barrio, Dan Van Herpe, Ian Fantom, Szilvási László

Kontakto: [ztisljar \(ĉe\) gmail.com](mailto:ztisljar@ce.com)

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

